# EKO

**Esperiga Komuniko**

Subtene al la loka, landa, faka kaj regiona agado

## Enhavo

- Fondaĵo Canuto - raporto
- Pli da membroj por UEA!
- Movada giganto retiras sin
- Estonto por la Eŭropa Agado

Redakcio: Stefan MacGill, Mirejo Grosjean.

*EKO 2020-37 sendita el Budapeŝto, la 3an de julio*

*Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en multaj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol 1500 ricevantoj. Pli ol dumil kun plusendoj.*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA

# Fondaĵo Canuto rolas grave en la pandemio

En mondo kun deviga izoliĝo, aparte gravas la eblo aliri la retajn servojn de UEA, inter ili la vojo al revuoj *Esperanto* kaj *Kontakto*, Eventa Servo kaj la Monda Fest. Fondaĵo Canuto ludas valoran rolon en la membrigo de tiuj kun pagaj aŭ (pli ofte) transpagaj obstakloj. Ni kore invitas al novaj donacantoj esprimi solidarecon por teni la membraron de UEA vere tutmonda. La suba resumo pri la laboro de la Fondaĵo jam iris al la estraroj de UEA, TEJO kaj ILEI, krome al donacintoj al la fondaĵo tra la lastaj jaroj. Alta proprcio de tiuj donacintoj estas ripetaj herooj; iuj donacadis eĉ kelkfoje tra la jaro kaj jaroj. Ni opinias maljuste fari alvokojn nur al tiuj seriaj donacantoj – jen vasta kaj ĝenerala alvoko.

Informoj pri donacado estas trovebla ĉe: https://uea.org/alighoj. Eblas donaci por personoj, kiun vi mem elektas.

=================

Jen la stato de FC por 2020 je la 18a de junio 2020 (413 entute – kun celo 500).



**Afriko (subsahara) 22 landoj, 127 membroj:** Angolo 3, Benino 20, Burkino 1 (junulo), Burundo 7, Ĉado 3, Centra Afrika Resp. 1 (junulo), Etiopio 2, Ganao 3, Kameruno 3, Kenjo 1, Komoroj 2, Kongo DR 34, Madagaskaro 4, Malio 2, Niĝero 2, Niĝerio 1, Ruando 2, Senegalo 9, Sud-Afriko 2 Tanzanio 6, Togolando 12. Ugando 1 (junulo).

**Ameriko: 14 landoj, 85 membroj:** Argentino 6, Bolivio 1, Brazilo 23, Ĉilio 2, Gvatemalo 2, Honduro 1, Kolombio 5, Kubo 23, Meksiko 6, Nikaragvo 2, Peruo 4, Venezuelo 2.

**Azio: 15 landoj, 101 membroj:** Ĉinio 1, Filipinoj 6, Hinda Unio (Barato) 6, Indonezio 9, Irano 12, Kamboĝo 2, Kazaĥio 2, Mongolio 9, Nepalo 12, Orienta Timoro 3, Pakistano 18, Taĝikio 1,Tajlando 1 (junulo), Uzbekio 6 (2 junaj). Vjetnamio 16.

**Eŭropo: 13 landoj, 79 membroj:** Albanio 10, Belorusio 2, Bosnio-Hercegovino 10, Bulgario 10, Francio 2, Germanio 1, Makedonio 2, Rumanio 13, Rusio 8, Serbio 6, Ukrainio 11

**MONA: 7 landoj, 27 membroj:** Alĝerio 3 Armenio 6, Kartvelio 2, Maroko 3, Palestino 1 (junulo), Tunizio 3, Turkio 9.

Ni tre intence provas uzi la Fondaĵon por membrigi junulojn kaj virinojn (cito el raporto de 2019).

La ciferoj estas kiel raportitaj de la reta oficejo de UEA – malgrandaj modifoj povos okazi. La hodiaŭa sumo (julio 2) por FC 2020 estas 418.

===================

# 'Pajo' retiras sin el aktiva agado



'Pajo' estas la karesnomo de Zlatko Tiŝljar, preskaŭ tutviva aganto por Esperanto. En la plej freŝa numero de *Eŭropa Bulteno* (n-ro 203), li anoncas sian kontraŭvolan retiriĝon per ĉefartikolo, kiu resumas lian agadon tra la jardekoj. Ni alkroĉas la retan formon de tiu revuo, kiu ja enhavas fotojn.

Li mem delonge redaktis tiun bultenon, kiu portis novaĵojn pri la movado en Eŭropo kaj pli specife pri la agado de la Eŭropa Esperanto-Unio (EEU). EEU organizis serion da Eŭropaj Kongresoj kaj sisteme prizorgis lobiadon ĉe la Eŭropa Parlamento kaj la aliaj instancoj de EU. 'Pajo' iĝis ĝia sekretario en 2005.

En EEU kaj la Eŭropa Komisiono de UEA devas okazi debatoj kaj planado, kiel repreni la agadon kaj mildigi la perdon de esenca movada motoro.







================ vortoj: 495 ===============

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis 2020/18. Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.